

## & Testamento:

< Rekante 21 el 43 batoj por strofo, entute 258 paŝoj dum 3 minutoj. Poemon verkis Emba. Baladigis Martin Strid (2015) per novaj melodio kaj rekantaĵo.>

### (#Melodio:

<:43> (/So dodo SoSo LaSo FaaMi;Mi SoSo LaLa LaTi do do;So dodo SoSo LaSo FaaMi;Mi LaLa SoFa LaSo FaMi; SooSoSo LaSo SoTi dodo;

(#Rekantaĵe: dodo mimi re La3;La TiTi rere do So; doododo SoSo Ti La;La SoSo LaSo Fa Mi; So LaTi re do o) )×6 )+

### (&Strofoj:

'1 /Ekfebris pens': la tero tuta ; pereos per atom-ekstermo! ; En ĉi pereco absoluta ; la mondo estos do kaputa ; kune kun mi, la eta vermo.

(×:; **Jen la testamento ; de nuna nia gento ; Tuja pereco tuta ; en morto absoluta. ; Ĉu resti muta? .)**

'2 Mondkataklismo min forviŝos, ; ne aĉa krev' en orfa solo. ; Ŝtiparo mia vere riĉos, ; se la homaro kunbruliĝos. ; Ĉu estas do pli da konsolo? .....

'3 Konsolo? Ho ne! Fia vanto! ; Skorio de anim' ribela! ; Mi diru en ĉi tiu kanto, ; eble la lasta, de mortanto, ; ke l' vivo estas tamen bela! .....

'4 Al vi mi diras, hom'! Ne lasu ; perej la homvivo varman, ; leviĝu, ĉiuj, kaj amasu, ; kaj krii, hurlo kaj frakasu ; la frenezumon atom-arman! .....

'5 Tial la Hom' do iĝis granda, ; kapabla eĉ por mondrenverso, ; ke uze de ĉi pov' giganta ; li mem elmortu, memmurdanta, ; por mokrideg' de l' Universo? .....

'6 Ne! Venku la pli homa homo! ; En tiu sento orakola, ; ke li sen funga mondfantomo, ; sen mensa diseriĝ-simptomo ; plezuros pri la viv-aromo, ; mi feliĉege mortos sola. ....)